

Periodaĵoj

Redakcia adreso:
Tusnádi u. 14.
H-1125 Budapest,
Hungario
Tel: (+36-1) 1557144

Bibliografia organo de Rondo Takács

julio, 1993.

Redaktas D-ro Árpád Máthé. Kunredaktoroj: Luis Hernandez Yzal, Ana Molera Urgellés.

Kion ni celas?

- 1) En formo de monata periodaĵo aperigi la bibliografiajn esplorojn de nia Rondo Takács. Laŭ iniciato de s-ro L. Hernandez Yzal antaŭ ses jaroj fondiĝis la nuna redaktora triopo memore al d-ro József Takács, kompilinto de la unua "Katalogo de la Esperanto-gazetaro".
- 2) Per tiu ĉi organo ni ŝatus inviti al kunlaboro ĉiujn bibliografiemajn kolegojn, historiistojn de planlingvaj movadoj, redaktorojn de planlingvaj periodaĵoj kompletigi nian - certe mankohavan - liston. En la pasinta jaro en Sant Pau d'Ordal Hispana Esperanto-muzeo eldonis sub titolo "Inventaro de planlingvistikaj periodaĵoj" la unuan parton de bibliografio de planlingvaj periodaĵoj, kompilita de la fondaj anoj de nia Rondo Takács, s-ino Ana Molera Urgellés, s-roj L. Hernandez Yzal kaj Á. Máthé. Plej urĝe ni bezonas kompletigon de tiu jam aperigita verko.
- 3) Ni celas informi niajn abonantojn pri ĉiuj novaj planlingvaj periodaĵoj.
- 4) Ni helpos pliampleksigi la interŝanĝan agadon de niaj legantoj per publikigo de ĉi-ri-lataj anoncoj.
- 5) Ni planas aperigi koncizajn artikolojn pri la historio de la esperanto-periodaĵoj.
- 6) Ni informos vin pri la plej gravaj publikaj kaj privataj esperanto-bibliotekoj de la mondo, antaŭ ĉio pri iliaj periodaĵ-kolektoj kaj interŝanĝ-proponoj.

La suprajn celojn ni jam listigis sur la unua paĝo de "Periodaĵoj en aŭ pri esperanto kaj aliaj planlingvoj", Nov. 1990, Budapeŝto. La unua numero de la nove lanĉita organo havas alian titolon kaj aperas kiel suplemento de *Eventoj*. Minimume dufoje jare ni aperigos nian novan organon en tiu ĉi formo, alitempe ricevos nur tiuj, kiuj kontribuos al niaj celoj, sendos kompletigajn indikojn pri la bezonataj de ni periodaĵoj, aŭ sendos minimume 2 kilogramojn da esperanto- (aŭ en aliaj planlingvoj) periodaĵoj al unu el la tri bibliotekoj de fondaj anoj de Rondo Takács laŭ la adreso:

Hispana Esperanto-Muzeo, Str. Dr. Zamenhof 12, E-08739 Sant Pau d'Ordal, Hispanio;

Esperanto-biblioteko "Ramon Molera Pedrals", Palau 17, E-08180 Moia (Barcelona), Hispanio;

Esperanto-biblioteko "Máthé", D-ro Árpád Máthé, Tusnádi u. 14, H-1125 Budapest, Hungario.

Ne forgesu, ke eĉ unu datumo servos al nia komuna celo: havi kiel eble plej kompletan bibliografion de la planlingvaj periodaĵoj. Anticipan dankon pro via helpo!

La Redaktoro

Apartan dankon al s-ro Luis Hernandez Yzal (Sant Pau d'Ordal) kaj s-ino Ada Császár (Budapeŝto) kiuj ankaŭ per mono helpis la aperigon de tiu ĉi numero.

Omaĝe al Cesar Vanbiervliet

Antaŭ duonjaro forpasis en Kortrijk s-ro Cesar Vanbiervliet. Per tiu ĉi malfrua kaj nekompleta nekrologo ni omaĝas al ĉelkonscia kaj persista esperantisto, kiu sukcesis krei unikan periodaĵ-kolekton kadre de la Urba Biblioteko en Kortrijk. El pli ol 11.000 jarkolektoj li kompletigis ĝis la komenco de 1992-a jaro 9223 jarkolektojn. Sur bretoj de la moderna konstruaĵo de la Urba biblioteko estis kaj estas studeblaj la valoraj kulturaj trezoroj de nia movado. Li estis tre serioza interŝanĝ-partnero, esploristo kaj bibliografo. Ĉiama kontakto kun divesaj E-bibliotekoj, kompilado de periodaĵ-katalogoj servis al la rapidaj kompletigoj de la volumoj en la "Fondaĵo Cesar Vanbiervliet". Ĉiam kun estimo kaj danko mi memoras pri li, kiu estis - kiel ni ĉiuj - homo mortema, sed li kreis ion por la aliaj: ampleksan bibliotekon, riĉan je periodaĵoj aperintaj en aŭ pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj.

Li vivis 87 jarojn, meze de la dudekaj jaroj li aliĝis al la movado kaj dum la pensiaj jaroj li reaktiviĝis, glorie plenuminte misian taskon: kolekti tiujn presaĵojn, kiujn ofte individuoj kaj bibliotekoj traktas kiel nekonservindajn paperojn. Lia kulturserva agado helpas al tiuj, kiuj estimas la historion de nia movado kaj ĉerpas el la spertoj de niaj pioniroj kaj samtempuloj.

Ni, kolektantoj-esploristoj neniam forgesos lin, ĉiam ni klopodos sekvi lian ekzemplon kaj agi laŭ liaj celoj.

A. M.

Gratulon al la fondinto Luis Hernandez Yzal

Hispana Esperanto-Muzeo

De 25 jaroj Sant Pau d'Ordal estas unu el la kulturaj centroj de Esperantujo

Certe multaj el la kongresanoj en Valencio partoprenos ankaŭ la antaŭkongreson kaj jaŭde, la 22-an de julio pasigos kelkajn horojn en la unika Esperanto-Muzeo en Sant Pau d'Ordal. La tuta amplekso de la

nuna numero de *Periodaĵoj* ne sufiĉas por informi vin pri la detaloj de tiu biblioteko, periodaĵ-kolekto kaj arkivo de la "esperanta popolaro", kiel kutimas diri s-ro Luis Hernandez



1968 - 1993

lzzal, fondinto kaj direktoro de la Hispana Esperanto-Muzeo. Antaŭ 25 jaroj oni povis viziti nur ĉambreton en la malnova privata domo, nun la vizitantojn atendas pli ol 200-kvadratmetra muzeo, kun gasteĉambro, studĉambro kun diversaj necesaj ekipaĵoj.

Eble jam centoj da homoj spertis la gastamon de tiu ne ĉiutage renkontebla geedza paro: Tereza kaj Ludoviko, kiel ilin alparolas la proksimaj amikoj. La valoran enhavon pliriĉigas la arta aranĝo far Tereza kaj la komputika scio de la filo, Rafaelo. La ekzemplodona familia kunlaboro, persista, senhalta bibliotekista kaj bibliografia laboro kaj nemal multe da financa ofero rezultis tiun ĉi kulturan centron de la Okcidenta Eŭropo. Pli ol 12 mil jarkolektoj de periodaĵoj, 8,4 mil libroj kaj broŝuroj, krome miloj da diversaj esperantaĵoj konsulteblas en tiu ĉi trezorejo. Vere temas pri trezorejo por tiuj, kiuj serioze interesiĝas pri historio, literaturo, faka aplikado de la internacia lingvo esperanto.

Se vi renkontos la gesinjorojn Hernandez dum la kongresaj tagoj, bonvolu saluti ilin okaze de tiu ĉi kvaronjarcenta jubileo. Ili ja meritas tion!

Ĝis la renkontiĝo salutas ilin el la malproksima Budapeŝto

la Redaktoro